

István Nemere

La domo

Estis ili duopo, junulino kaj junulo, fortaj, fidemaj: do ili komencis agi. La forton kaj la ŝviton de siaj korpoj, la sangon de vunditaj manplatoj, laciĝintajn tendenojn de piedoj ili kunkonstruis en tiun domon.

Ĉio ĉi daŭris multajn jarojn. Kelkfoje mankis al ili la mono, do ili reveturis al benzinodoraj stratoj, al la hurlanta urbo. Ŝia hararo senkoloriĝis, ĉirkaŭ la okuloj kolektiĝis sulketoj. Ŝi fariĝis lacema, nervoza. La viro jam estis cinikulo, strebaĉanto.

Sed la domon ili ne perfidis, ties ideo tuttempe vivis en ili. Estis ĝi fera deziro, morda, obstina sonĝo. Ili sciis, ke ĝin ili devas konstrui. Altigos ili tiujn murojn, kovros ĉion per tegmento prirevita...

Denove pasis kelkaj jaroj. Ili ankoraŭ ne estis mezaĝaj, sed ja ne plu junaj. Lia iro estis urseca, Ŝi fariĝis pli osteca, malmolpieda. Ankaŭ ŝia voĉo estis jam pli dura.

Staris fine la muroj, nuda skeleto de la ĉambroj. Iuvespere ili eniris, haltis meze, sed nur fakvortoj aperis en la cerboj. Mortero, akvotubo, ĉarpentilo, kahelo, hejtilo. Do, ili plu konstruis la domon. Printempe pluvegoj rapidaj, dum la longaj aŭtunoj, obstinaj, grizaj pluvoj malhelpis ilin. Vintre la senkolora betono elstaris el la neĝa kovrilo. Somere la aero vibris pro la varmego kaj ili soifis.

Iutage la domo finfine estis preta. Do, ili tuj komencis alkonstrui ankaŭ la barieron ĉiuf flankan kaj pordegon belan. Poste ili konstruis vojon de la pordego ĝis la domo, kaj ĝardenon verdan, floran; portis ene la meblojn, pendigis lampojn kaj kurtenojn. El la kranjoj elverŝiĝis akvo, lumo dissaltis ĉien en la ĉambroj.

Duope, ili fine eniris. Sidiĝis ili en la plej grandan ĉambron. La silenton ŝiris nur ilia anhelo. La virino, la viro rigardis la murojn. Ja ili konis bonege ĉiun brikon, fenestrokadron, plankotabulon, klinkon.

Ili estis nur tre lacaj. Kaj ankaŭ la silento fariĝis ne elportebla.

Kaj ambaŭ subite eksentis, ke ili ne plu havos kion diri unu al la alia.

Aperis en libro:

István Nemere: Krokize de mia ĝardeno

Kooperativo de Literatura Foiro, 1992